PILO-PRESS
Interncia Informservo

N-ro 3/1973 - 16 jan 73
Aperas ĉiusemajne

3a Jarkolekto
Jara abono 73
20,- GM
==============
Pĉk. Nürnberg
819 56 - 851

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Instruistoj lernas Esperanton

Paderborn/Löhne (hb/ujm) Pilo-Press jam mallonge raportis pri la dua intensiv-kurso de Esperanto de la 3-a ĝis la 8-a de januaro 1973 en la universitato de Paderborn. Hodiaŭ ni nun publikigas resuman raporton de la aranĝantoj, Hermann Behrmann kaj Uwe Joachim Moritz. -

Apenaŭ la unua intensa lingvolaboratoria kurso organizita de la Landa Sekcio Nordrejn-Vestfalio de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI-NRV) finiĝis en Bielefeld, kaj jam eliris centoj da invitiloj por nova kurso, ĉi-foje en Paderborn. En tiu ĉi urbo troviĝanta 40 km sude de Bielefeld en Vestfalio ekestis antaŭ nelonge nova tipo de universitato kuniganta ĉiujn ĝisnunajn fakajn altlernejojn.

En ties lingvolaboratorio kolektiĝis de la 3-a ĝis la 8-a de januaro 25 geinstruistoj kaj aliaj personoj por studi la Internacian Lingvon. Estas aparte menciinde, ke dum la inaŭguro okazinta en la ĉefa konferencejo de la Universitato, direktis salutvortojn al la kursanoj la vic-urbdirektoro, D-ro Löwenberg, substrekante la daŭrajn lingvajn malfacilaĵojn okaze de vizitoj de enloĝantoj de la ĝemelaj urboj Paderborn kaj la franca Le Mans. Krome kiel reprezentantoj de la Universitato parolis la estro de la lingvolaboratorio, lektoro Robin Hammond, kaj (en Esperanto) la docento pri matematiko, d-ro Hans Kasselmann. (Foto: Dum la inaŭguro kun televida teamo)



Karakterizis la inaŭguron, ke oni sufiĉe multe parolis la Internacian lingvon; la kaŭzo estis la ĉeesto de du observantoj el Jugoslavio, s-roj Senad Čolić kaj Šefik Rizvanović, la unua estas estrarano de TEJO.- Post la salutvortoj prezentis tre koncizajn referaĵojn s-roj Uwe Joachim Moritz ("Esperanto en lernejo kaj universitato") kaj Hermann Behrmann ("La lingvistika profilo de Esperanto"). Agrable sentiĝis la akordeonaj ludoj enkadrigintaj la kunvenon.
(Daŭrigo sur paĝo 2)

Daŭrigo p. 1

Ne atendita ero en la programo de tiu unua kursa kunsido estis ŝovado de lampegoj, reĝisorado, transporto de kabloj: 8-persona teamo de la 3-a Okcidentgermana Televido de Kolonjo registris preskaŭ la tutan solenaĵon kaj poste ankaŭ la unuan lingvolaboratorian lecionon, inkluzive intervjuon kun kursestro Hermann Behrmann. La registrita filmo estis elsendita lundon, 8 jan 73, je 19,15 h en la programo "Prisma des Westens" (Prismo de la okcidento) dum proks. 10 minutoj. La rigardantoj de tiu 3-a programo estas plejparte intelektuloj. - Ankaŭ la gazetaro raportis (3-foje) kun fotoj.

La labormetodo de tiu ĉi kurso esence egalis tiun de la Bielefelda: Traktinte certan lecionon surbaze de "Esperanto programita" la kursanoj trejnis sin koncerne tiun saman materialon en la lingvolaboratorio. Tamen ekzistis certaj diferencoj kompare Bielefeld, i.a., ke oni laboris en du klare dividitaj nivelgrupoj. La progresintoj kombinis laboratorian trejnadon kun konversacio.

Dum la kurssemajno AGEI-NRV havis estrarkunsidon, dum kiu oni traktis aktualajn problemojn kaj decidis interalie klopodi pri 3-a intensa kurso dum la Paskaj ferioj (2-7 aprilo 1973) en la Universitato Siegen. (Detala informilo estas havebla ĉe Hermann Behrmann).

********

Pro la intensa studado evidente ne povis aperi tro multaj distraĵoj. Tiel oni faris nur promenadeton tra la historia urba centro kun vizito al la katedralo kaj al la interesa fontaro de la rivereto Pader, kaj krome viziton al la universitata kalkulcentro, kie d-ro Kasselmann eksplikis al la scivolemuloj kelkajn interesajn aspektojn de elektronikaj "cerboj". Tre agrabla kafumado en la granda konferencejo, laŭ invito de familio Kasselmann, apartenis al la societa vivo de la kursanaro.

## Ĉu lingvolaboratorioj nur en Nordrejn-Vestfalio?

## Nova intensa kurso anoncita

Gronau. (PP) Jam denove estas anoncita intensa kurso de Esperanto, ĉi-foje por la semajnfino 10/11 feb 1973 en la lingvolaboratorio de la popolaltlernejo Gronau. La programo antaŭvidas lingvolaboratorian studadon, prelegon pri Esperanto kaj akcepton fare de la urbo Gronau. Informon donas: Verband Dt. Esperanto-Lehrer, 4972 Löhne 1

En Nordrejn-Vestfalio Esperanto komencis enpenetri la lingvolaboratoriojn, dank' al la laboro de du instruistoj-esperantistoj, Hermann Behrmann kaj Uwe Joachim Moritz. Dum la kurso en Paderborn iu ŝercemulo demandis, ĉu lingvolaboratorioj nur ekzistas en Nordrejn-Vestfalio? Ŝajne la demandinto pravas. Sed tiun mankon oni povas forigi. Eble aliaj esperantistoj-instruistoj sekvos la NRV-ekzemplon. En la bavara Schwabmünchen Gerald Tucker ja komencis instrui Esperanton al lernantoj en lingvolaboratorio....La bavaroj tamen ne ĉiam estas la lastaj....

**************

Post la kurso progresiga lernolibro por germanoj denove havebla. Prezo 4,60 GM ĉe Ludwig Pickel, 85 Nürnberg.

La nova estraro de GEJ

Nürnberg(PP) En nia raportado pri la GEJ-seminario en Darmstadt kaj la konsisto de la nova GEJ-estraro bedaûrinde enŝteliĝis eraro. Sekretario fakte fariĝis Harald Schicke, Hamburgo, kiu cetere ... dum la silvestra balo funkciis kiel disko-ĵokeo. S-ro G.D. Winkler nek estas estrarano de GEJ nek estis proponita por ia estrara posteno.

La nova estraro de Germana Esperanto-Junularo do ekzistas el jenaj 6 personoj:

| | | |
|---|---|---|
| Helmut Klünder | - | Prezidanto |
| Hans-Dieter Platz | - | Vicprezidanto kaj kasisto |
| Ingrid Maier | - | Seminarioj |
| Ulrich Brandenburg | - | Rilatoj al TEJO kaj IJK 74 |
| Franz Kruse | - | Loka kaj regiona agado |
| Harald Schicke | - | Sekretariaj aferoj |

**************

Tra la mondo

Anoncoj en 300.000 ekzempleroj reklamis pri Esperanto en la ĵurnalo LA VOIX DU NORD, Lille. Temis i.a. pri adreso de UFE, korespondaj kursoj, delegitoj en Norda Francujo ktp. )Lgx)

Onisaburo. Post Parizo, tiu arta ekspozicio okazos en du aliaj Francaj urboj, nome Besancon kaj Marseille. Krome, Oomoto eldonis franclingvan adapton de libro de Deguchi, kie la aûtoro plurloke mencias Esperanton,sub la titolo "Onisaburo Deguchi, un grand homme".(LGx)

Tygodnik Polski, eldonata en Parizo, aperigis plurajn longajn artikolojn pri Esperanto. Lastan monaton, redaktoro intervjuis plurajn francajn esperantistojn pri Pollando, literaturo, Torun kaj la Lingvo Internacia. (LGx)

Itala vizito en Kopenhago. Inter kristnasko kaj novjaro grupo de 40 junaj esperantistoj el la norditalaj urboj Verona kaj Padova vizitis Kopenhagon kaj ĉirkaûaĵon. En ĉiuj lokoj esperantistoj akceptis la italajn gastojn. Pli granda renkontiĝo okazis la 28 dec 72 en la fervojista klubo de Kopenhago. Pri la vizito en Malmö raportis la loka gazeto "Skanska Dagbladet". La viziton organizis Uwe Lohse, Hillerod apud Kopenhago.

Esperanto en itala lernejo. Ek de la dua duono de oktobro 1972 funkcias Esperanto-kurso en la Lernejo Oltresavio de la itala urbo Cesena. La kurso okazas en la kadro de "integrativaj agadoj"laû peto de gepatroj kaj esperantistoj. La oficiala, plenrajta enkonduko de Esperanto en tiun lernejon estas la rezulto de la loka Esperanto-Grupo, kiun fondis antaû du jaroj librotenisto Antonio Gambuti kaj prof. Romeo Pagliarani. La Esperanto-instruadon prizorgas instruistino Taddei Franka. Esperantistoj en la tuta mondo estas petataj sendi gratulojn kaj dankesprimojn al Direktoro Mariani, Scuola Elementare Oltresavio, Cesena (Fo), Italio.

************

1 JUNA AMIKO = 1 GM Miloj da Junaj Amikoj atendas vin. Ili volonte venos al vi, ili volas distri kaj ĝojigi vin. Aĉetu ankaû vi provnumeron de la Internacia Lerneja Esperanto-Revuo ĉe Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1.

I L E I - informoj

Komence de la jaro la vicprezidanto de ILEI, Helmut Sonnabend, Dollbergen, restadis en Maribor kaj intertraktis kun Konstanta Organiza Komitato la programon de la ILEI-kongreso de la 21 - 27 julio 1973 kaj de la konferenco pri Pedagogia Didaktika Eksperimento (PDE) de la 18-20 julio. Pri ĉiuj organizaj demandoj oni atingis plenan interkonsenton. Pri ambaŭ aranĝoj la Sekretario por Kulturo kaj Klerigado de SR Slovenio, s-ro Bizajl, transprenis la aŭspicion.

Internacia Esperanto-Pedagogo (IPE)

La estraro de ILEI komisiis prof. d-ron Szerdahelyi kiel prezidanton de la ekzamena komitato de Internacia Pedagoga Ekzameno (IPE). La Ekzamena Komitato konsistas el prezidanto, sekretario kaj 30 konstantaj membroj. Ĉiu sukcesinta kandidato ricevos diplomon kaj rajtas uzi la titolon Internacia Esperanto-Pedagogo, mallonge: dpl. IPE. Informojn pri IPE donas vicprezidanto de ILEI, Helmut Sonnabend, 3161 Dollbergen, Im Eckerkampsfeld 11a, FRG

Eksperimento en eksperimenta klaso

Kiel konate nuntempe funkcias la kvinlanda lerneja eksperimento, en kiu partoprenas 35 lernejoj kun entute 1.107 infanoj. En la eksperimento partoprenas ankaŭ la klaso de la instruistino Marija Lengar de la Elementa Lernejo "Tone Ĉufar". Dum unu leciono nun Helmut Sonnabend, rektoro el Dollbergen, FRG, anstataŭis la slovenian instruistinon - kun permeso de la lerneja direktorino - kaj povis tiel konstati, ke la eksperimenta instruado de Esperanto jam montras bonajn rezultojn. 30 infanoj en la aĝo de 11 jaroj atendplenaj ĝaje kaj elkore salutis la anstataŭan instruiston el alia lando. La interkompreniĝo en Esperanto funkciis perfekte. Demando kaj respondo tien-reen freŝe flugis. Sed ne nur la bonaj scioj de la infanoj surprizis s-ron Sonnabend, impresis lin ankaŭ la ruĝa dianta bukedo kiel adiaŭa saluto. Resume oni povas nur diri: Preskaŭ neverŝajna situacio - germana instruisto en slovena klaso instruante Esperanton. - La estonteco jam komenciĝis!

***********

La semajno en la radio (PP)

Berno. Ges-roj Gacond parolis pri la Sonrevuo "Amika voĉo" sonbendoj esperantlingvaj por blinduloj, kiuj jam aperas de 9 jaroj kaj estas aŭdataj en 17 landoj. Tiucele Radio Bern senpage disponigas la Esperantlingvajn programojn.- Daŭrigo de la leterkestaj respondoj. Zagrebo. Karnavalo ankaŭ regas en Jugoslavio, kiel oni povis aŭdi en la Novaĵoj. En la dua parto oni povis aŭdi la raporton pri la eksterordinara kunveno de jugoslaviaj esperantistoj en Ljubljana, pri kiu detale Pilo-Press raportis en sia pasinta numero. Aŭdiĝis ankaŭ informo pri la TEJO-kongreso en Sarajevo. En la venonta elsendo oni parolos pri la Esperanto-agado en Beogrado. Varsovio. La vjetnama problemo, la usona kapitalo en Okcidenta Eŭropo, la elpaŝo de Edward Gierek dum partia konferenco, la ĉefministra vizito en Hindujo - jen kelkaj pritraktitaj temoj. La leterkesto okupis sin pri polaj temoj kaj disaŭdigis intervjuon kun finna esp-isto pri Radia Vortaro. La rubriko "El la vivo de PEA" diskutis pri la problemoj de lokaj grupoj (Jerzy Grum).